

Kluba Bulteno

Organo de Klubo Esperantista en Oslo

N-ro 3 2017

Ĵaŭdon la 31an de aŭgusto

65a jaro

Kalendaro

Ĉiuj vesperaj kunvenoj komenciĝos je la **18a 30.**

Mardon la 5an de septembro (semajno 36) – *tirsdag*

Kjell Peder Hoff raportas pri la Universala Kongreso en Sud-Koreio.

Kjell Peder Hoff forteller om verdenskongressen i Sør-Korea.

Lundon la 18an de septembro (semajno 38) – *mandag*

La ĵusa parlamenta elekto. Ĉu la demokratio bone funkcias? Ĉu la rezulton tro influis la sojlo por ricevi krommandatojn?

Stortingsvalget. Fungerer demokratiet godt? Ble resultatet for avhengig av sperregrensen?

Mardon la 3an de oktobro (semajno 40) – *tirsdag*

Vira kaj virina lingvoj. Viroj kaj virinoj, kvankam egalas, tamen ne same uzas lingvon. Anna Maria (vd. p. 3) rakontos el sia diplomlaboro. Ĉu ni trovos diferencojn en uzado ankaŭ de Esperanto kaj la norvega?

Manns- og kvinnespråk: Menn og kvinner bruker språket ulikt. Anna Maria (se s. 3) forteller fra diplomarbeidet sitt. Finner vi forskjeller også i bruken av esperanto og norsk?

Lundon la 16a de oktobro (semajno 42) – *mandag*

Studkunveno. Ni pludiskutos malnetan tradukon de broŝuro pri malnovaj metioj.

Studemøte. Vi fortsetter å diskutere et utkast til oversettelse av en brosjyre om tradisjonelle håndverksyrker.

Kaj ni aranĝas kromkunvenojn kiam venas eksterlandaj gastoj.

OKAZIS

Kontakto kun afrikanoj (4. 4)

Kontrastaj spertoj pri kontakto kun afrikaj E-aktivuloj:

Izola senlabora rifuĝinto reskribas ĉiumonate postulante mon-helpon. Dinamika klubprezidanto iniciatas profitdonan lokan komercon, organizas socian helpon al orfoj kaj vidvinoj, kaj altiras donace komputilojn, traktorajn kaj novan buseton. Ni bonhavaj norvegoj povas facile kontribui: ĉu unuopule aŭ organizaĵe?

Tradukekzerco (2.5)

Ni diskutis tradukon de du pliaj paĝoj pri *Malnovaj metioj*, diskutante elekton de ĝusta traduko de vortoj pri specialaj procezoj.

Nova laborplano de NEL (15.5)

Leif Arne Storset, kiu partoprenis en la komisiono pri la strukturo de strategia plano kaj laborplano de NEL, kaj raportis en *N.E-isto* 2 pri la rezulto, respondis al niaj duboj kaj demandoj kaj instigis nin

Poste okazis ankaŭ kromkunvenoj:

11an de julio kun Eddie van den Bosch kaj Ella Strug el Antverpeno, kiuj prizorgis la kuirejon dum la Kulturaj Tagoj en Lesjöfors

kaj la 18an de aŭgusto kun Anna Maria el Vroclavo, Pollando, kiu restos tutan jaron en Oslo (vidu p.3).

prezenti konkretajn proponojn por la diskuto dum la Landa Kunveno en Sandnes post 2½ semajnoj.

Biciklonte ĉirkaŭ la mondo (30.5)

Kromkunveno kun Cirilo kaj Roz', kiuj biciklas – por la dua fojo – ĉirkaŭ la mondo. Nia aŭdis – kaj vidis ekrane – bicikladon tra inundo en Nepalo kaj dezerte ĉe 5000 m en la sudamerika montaro. Ili kunportas ĉiom por povi sovaĝe tendumi, sed kelkloke sukcesas trovi esperantistojn ĉe kiuj tranokti.

Pri la ĵusa landa kongreso (6.6)

La partoprenintoj de la ĵusa landa kongreso en Sandnes raportis pri la rezultoj, precipe pri la elektoj kaj la ekskurso laŭ la "planeda pado". Kaj almenaŭ unu novan vorton lernis ĉiuj: *brisling* = sproto.

Tradukekzerco plue (13.6)

Ni daŭrigis nian tradukadon de "Malnovaj metioj".

Gastaktivulino

Mi nomiĝas Anna Maria, familiano estas (tro) longa kaj komplika:
Konieczpolska-Lachowska.

Mi estas polino kaj en Pollando mi finstudis je magistra nivelo psikologion kaj polan literatursciencon kun lingvoscienco kaj historio. Mi volas daŭrigi je doktora nivelo kaj mia revo estas labori kiel instruisto en lernejo. Nun mi lasis mian familion kaj veturis al Norvegio por ŝparkolekti monon kaj finpagi ŝuldon al banko.

Mi esperantiĝis en 2012a jaro kaj tuje komencis agadon en Pola Esperanta Junularo. Mi reprezentis PEJ dum diversaj eventoj inter junularaj organizoj en Pollando kaj en Eŭropo. Mi ĉeestis i.a. konferencojn pri lingvoj de malplimultoj en Budapeŝto, malplimultaj rajtoj en Kudova, pri edukado pri holokaŭsto en Krakovo kaj en Telavivo. Mi helpis reklami PEJ kaj Esperanton dum junularaj eventoj – foiroj de studentaj organizoj en Vroclavo, Krakovo, Varsovio, malfermaj tagoj de lernejo en Konin, tago de lingvoj en Vroclava biblioteko, Slot Arta Festivalo en Lubiaż. Dum du Internaciaj Junularaj Kongresoj – en Israelo kaj en Germanujo – mi kolektis spertojn por poste prizorgi organizadon de IJK 2016 en Vroclavo, mia hejmurbo. Mi provis kunlabori kun Pola Esperanta Asocio, sed tio ne funkciis bone, mi kunlaboris dum du jaroj kun Silezia Esperanta Asocio, gvidante kurson por maljunuloj kaj organizante diversajn klubajn aranĝojn. Mi rezignis de PEJa estraro dum maja kunveno ĉi-jare.

Mi venis de Pollando 21an julio por labori i Oslo (en *United Parcel Service* – *UPS Norway*) kaj komence, kiam mi serĉis loĝejon, mi portempe dormis en la klubejo. Estis oportune, ĉar mi laboras ne tro for de ĝi. Nun mi loĝas en Lørenveien kaj pro tio mi volas organizi iun kurson en la klubejo, por varbi homojn, por ke ili sciu, ke Esperanto vivas, funkcias kaj povas esti utila ankaŭ en Oslo.

Anna Maria

Ĉu vi konas iun kiu interesiĝus partopreni en ŝia kurso por komencantoj?

Kromekzempleroj

En la klubejo ni havas grandan kolekton da kromekzempleroj de internaciaj periodaĵoj el la lastaj jaroj: *Heroldo*, *Sennaciulo*, *Literatura Foiro*, *Kontakto* k.a. Senpage preneblaj!

Ĉu iu volas lui kunvenĉambron? – leie møterom?

Nia kunvenejo estas ofte neuzata, sed taŭgus por kunvenoj de malgrandaj grupoj aŭ – post rearanĝo de la mebloj – ĝis ĉ 20 homoj. Ekz-e por loka sekcio de tutlanda organizo. Alloga povas esti la rekta eniro el la strato. Ĉu vi konas iujn kiuj bezonas kunvenejon?

Kjenner du noen som kunne være interessert i å leie møterommet vårt for én eller flere kvelder? Eller en helg? Vi trenger leieinntekter! Brosjyre med nærmere opplysninger og bilder kan du få fra kontoret.

Info-budoj en foiroj?

Info-budoj en foiroj k.s. donas bonan sed maloftan okazon renkonti la publikon – precipe junulojn – kaj informi pri Esperanto – kiel ekzemple en la Mela-festivalo (aŭguste ĉiujare). Ofte jun(et)uloj tute ne aŭdis pri ĝi, kaj ne imagas ke tia lingvo povas ekzisti kaj esti uzata.

Sed tiaj konferencoj kaj foiroj ne tre oftas. Foje ili okazas loke, for de la urbocentro, ekz-e en biblioteko. **Se vi scias / aŭdos** pri tia aranĝo, kie eblus starigi informbudon (senpage aŭ malmultekoste), **bv. sciigi tion al ni.**

Viktig: *Si fra om du vet om en messe eller festival e.l. hvor vi kan få satt opp en info-bod eller en liten utstilling. Eller et lokalbibliotek som er mot-takelig. Folk vet ikke at Esperanto finnes!*

Vi bonvenas viziti nian klubejon

en Sinsen ankaŭ kiam ne okazas kunveno. (vd. vojklarigon malsupre)
Tie vi povas

- preni kromekzemplerojn de *Kontakto*, , *Literatura Foiro*, *Sennaciulo* ...
- aĉeti kromekz. de bibliotekaj libroj (po 20 kr)
- aĉeti glumarkojn (po 2 kr) – aŭ librojn

Sed antaŭesploru telefone aŭ retpoŝte, ĉar ne ĉiam iu ĉeestas por malfermi.

Kom gjerne innom, men send e-post eller ring på forhånd, for det er ikke alltid noen tilstede.

Klubo Esperantista en Oslo, Olaf Schous vei 18*, 0572 Oslo. Tlf. 22 35 08 94
Tramo 17 al Sinsenterrassen aŭ buso 31 al Rosenhoff aŭ metroo 5 aŭ 4 al Sinsen.
Vd. pli detale interrete ĉe esperanto.no/oslo => "vojklarigo".

* inng. Schouterrassen. www.esperanto.no/oslo Retpoŝto: [oficejo\[a\]esperanto.no](mailto:oficejo[a]esperanto.no)
Bankkonto 0532 36 19699 (sed kotizon pagu al NEL/*Forbundet* 0533 05 22870).

Ĉi tiun *Bultenon* prizorgis Douglas Draper